
8

# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 42 (sepa jaro) Aprilo-Junio 1931

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

TEKSTO : La Internacia Laboroficejo en Genève. — La I.L.O. kaj la Studo de «Industriaj Rilatoj». — Eŭropa Unuiĝo kaj Internacia Laboroficejo. — La Progresoj de la Senlaboreco-Asekuro. — Japanujo ratifas alian Laborkonvencion. — Granda Britujo kaj la Konvencio pri Perforta Laboro. — Paĝo pri Kooperado.



## La Internacia Laboroficejo en Genève

La Internacia Laborogranizo, daŭra institucio de la Ligo de Nacioj, estis starigata per la Pac-kontraktoj ĉe la fino de la mondmilito. Ĝi celas la plibonigon de la vivkondiĉoj ĉe la laboristoj de ĉiuj landoj, kun la konvinko ke kontraŭaj labor-kaj vivkondiĉoj, kie tiaj kondiĉoj ekzistas, entenas la ĝermojn de internaciaj bataloj.

La Internacia Labororganizo funkcias tiel :

Ea *Internacia Laborkonferenco* kunigas unu fojon jare almenaŭ la reprezentantojn de la registaroj, de la dungistoj kaj de la laboristoj de ĉiuj Membro-Ŝtatoj, kun la celo starigi akordojn pri la minimumaj labor- kaj vivkondiĉoj de la salajritaj laboristoj ;

La *Administra Konsilantaro* de la Internacia Laboroficejo donas al tiu oficejo la necesan gvidadon kaj kontrolas la efektiviĝon de la laboroj komisiitaj al ĝi ;

La *Internacia Laboroficejo* preparas la kunsidojn de la Konferenco kaj plenumas la decidojn kiujn tiu ĉi alprenis. Ĝi ankaŭ agas kiel studa kaj informanta organo, disvastiganta la kunmetitajn sciigojn per publikigo kaj korespondado. La elspezoj de la Organizo estas kovritaj per kotizoj de la Membro-Ŝtatoj, laŭ speciala kalkultabelo. Ili atingas ĉirkaŭ 8 ½ milionoj da svisaj frankoj jare.

### La I.L.O. kaj la Studo de «Industriaj Rilatoj».

Dum sia kunsido en 1928, la Internacia Laborkonferenco adoptis rezolucion kiu petis la Oficejon « atente sekvi la evolviĝon de la kunlabora spirito inter dungistoj kaj laboristoj » en la industriaj laborejoj, kaj prezenti raportojn pri tiu problemo, kiun oni mallonge nomas « industriaj

rilatoj » (france : « relations industrielles », angle : « industrial relations »).

Niaj legantoj jam scias pri la publikigo, dum la jaro 1927, de studo, nun elĉerpita, pri la industriaj rilatoj en Usono. Tiu-ĉi volumo rezultis el vojaĝo al Ameriko de la Vic-Direktoro de la Internacia Laboroficejo, Sro. H. B. Butler.

Nun, la Oficejo komencis, kun la teknika kaj financa helpo de Usona organizo, la « Industrial Relations Councelors Inc. » en New York, kies reprezentanto en Genève estas Sro. Spates, la preparon de serio de tiaj studoj.

La kvin unuaj studoj jus aperis sub formo de dika volumo en franca, angla kaj germana lingvo. Ili koncernas la jenajn entreprenojn :

Elektromeĥanikaj konstruejoj Siemens en Siemensstadt apud Berlin ;

Karbominejoj en Lens (Francujo) ;

Londonaj Transportentreprenoj, London ;

Francaj minejoj en Saarteritorio ;

Ŝufabriko Bat'a en Zlin (Ĉeĥoslovakujo).

Tiuj studoj ne celas starigi teorion aŭ prepari doktrinon pri la industriaj rilatoj, sed nur prezenti kelkajn el la eksperimentoj faritaj en la kampo de industria mastrumado, por montri la veran gradon atingita ĝis nun en la rilatoj inter dungistoj kaj laboristoj, ĉu en la entreprenoj mem, ĉu pere de komunaj diskutadoj inter la profesiaj organizoj.

La ĉi-supraj entreprenoj estis elektitaj pli kiel ekzemploj ol kiel modeloj. Ĉiu el la kvin studoj entenas mallongan antaŭparolon pri la historio de la entrepreno, ĝia graveco, k.t.p. Tiun antaŭparolon sekvas priskribo de la organizo kaj administrado de la industriaj rilatoj. Oni priparolas en ĝi la internan organizon de la servo pri industriaj rilatoj, la historion de la rilatoj inter la entrepreno, la dungistaj organizoj kaj la laboristaj sindikatoj, kaj ankaŭ la agadon de la entreprenaj konsilantaroj aŭ aliaj similaj organizoj ekzistantaj ĉe la firmoj.

La studoj donas detalajn sciigojn pri la funciado de la sistemo, pri la metodoj sekvitaj por la direktado de la dungitoj, pri la profesia instruado, la eklernado kaj lernigo de novaj laboristoj, la higieno kaj antaŭforigo de la akcidentoj, kaj kelkafoje ankaŭ pri la pensioj, la partopreno en la profitoj, la asekuroj, la ŝparosistemoj kaj la diversaj sociaj servoj kiujn la entrepreno organizas. En ĉiu kazo, oni montris laŭeble la rolon ludatan de la kunlaborado inter la direktoraro kaj la laboristoj en la organizo kaj la funkciado de tiuj diversaj servoj.

Dua serio de studoj pri industriaj rilatoj estas preparota.

---

**Eŭropa Unuiĝo kaj Internacia Laboroficejo**

En la lasta numero de tiu bulteno, ni mallonge prezentis la problemojn jam ekstudataj de la Internacia Laboroficejo kiuj ĉefe interesas la Eŭropan kontinenton [1].

Ni finis la artikolon kun la demando : Ĉu estus eble aŭ dezirinde starigi specialan Eŭropan labororganizon ĉe la Internacia Labororganizo por la studo de tiuj speciale Eŭropaj problemoj ?

Al tiu demando ni provos respondi ĉi-sube per kelkaj konsideroj tia-rilataj.

*Speciala karaktero de la Internacia Labororganizo.*

Laŭ la packontraktoj la Internacia Laboroficejo estas organizo kies celo estas studi kaj solvi internaciajn problemojn rilatajn al laborkondiĉoj. Ĝi ricevis konstitucion kaj sistemon de procedo adaptita al la naturo de la problemoj kiujn ĝi devas pritrakti. Sen doni detalojn, ni devas tamen citi la ĉefajn ecojn de tiu konstitucio kaj de tiu procedaro.

La plej originala elemento ĉe la konstitucio de la Internacia Labororganizo estas la direkta partopreno de reprezentantoj de la dungistoj kaj de la laboristoj en ĝia laboro. La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo konsistas el dudekkvar membroj, el kiuj dekdu reprezentas la registarojn, ses la dungistoj kaj ses la laboristojn. La Internacian Laborkonferencon ĉeestas je kvar delegitoj po ŝtato ; du el ili reprezentas la registaron, du la dungistojn kaj du la laboristojn. Dank'al la ekvilibro starigita inter tiuj diversaj elementoj, la organoj de la Internacia Laborganizo prezentas justan reprezentadon de la interesataj partioj, donante samtempe la pliaŭtoritaton al la registaroj, kiuj posedas kvaliton defendi la interesojn de la tuta nacio.

La karakteriga elemento ĉe la procedaro de la Internacia Labororganizo estas la unuaranga rolo ludata de la leĝfarantaj aŭtoritatoj en ĉiu membro-ŝtato. Estas tiuj aŭtoritatoj kiuj, en ĉiu lando, devas decidi la alprenon aŭ la rifuzon de la projektoj de konvencioj kiujn la Internacia laborkonferenco adoptis, kaj sankcii ilin per oficiala ratifo.

Tiu sistemo ŝajnas vere bone adaptiĝi al la celoj de la Internacia Labororganizo. La nombro de la ratifoj ricevitaj post dekjara laboro pruvas kiel sukcesa la organizo estis, malgraŭ la specialajn malfacilaĵojn kunligitaj al la laborproblemoj.

Ŝajnas mem-komprenebla ke la laborproblemoj kiuj interesas speciale la Eŭropajn ŝtatojn povus pli utile kaj pli bone esti traktataj per procedo speciala al la Internacia Laborganizo ol per iu ajn diplomatia procedo kiu povus esti kreota por ebligi la funkciado de Eŭropa Unuiĝo.

*Universaleco kaj regiona specialigado.*

Ni devas ĉi-tie atendi tre kompreneblan kontraŭparolon. La Internacia Laborganizo estas tutmonda organo. Ĉu tiu tutmonda karaktero ne malpermesas ian geografian limigon al la ekzerco de ĝiaj funkcioj ? Tiu punkto bezonas klarigon. Estas vere ke la Internacia Laborganizo estas tutmonda — tio estas ja eĉ unu el ĝiaj ĉefaj ecoj. Oni tamen ne povas diri ke pro tio ĝi ne taŭgas por trakti specialajn problemojn. Malgraŭ la fakto ke la konvencioj adoptitaj ĉe la Internaciaj Laborkonferencoj plej ofte prezentas ĝeneralan karakteron, estas tamen eble starigi malpli universalajn regulojn. Jam ekzistas kelkaj internaciaj laborkonvencioj kiuj, pro ilia objekto mem, prezentas specialan karakteron, ekzemple la konvencio pri deviga aŭ perforta laboro de la indiĝenoj, aŭ ĉiuj konvencioj pri la laboro surŝipe. Flanke de tiu teknika specialigo, se oni povas ĝin tiel nomi, oni ankaŭ povas imagi geografian specialigon. Ne ekzistas do kaŭzo pro kio la Laborkonferenco ne povus adopti taŭgan procedsistemon por tia speciala agado.

Ju pli la laboro de la Internacia Laborganizo kreskas, des pli la neceseco diversigi ĝian agadon laŭ la speciala naturo de la solvotaj problemoj fariĝas memvidebla. El la laborproblemoj, kelkaj interesas pli speciale Eŭropon ; povus pro tio esti dezirinde trovi por ili solvon kiu respektus ilian kontinentan karakteron.

*La problemo pri kunordigo.*

La ĝeneralaj povoj kiujn la Internacia Laborganizo ricevis de la packontraktoj ne povas esti reprenataj. Aliaflanke, oni ne povas pensi ke tiuj povoj ie stariĝus kontraŭ tiuj kiujn la Eŭropa Unuiĝo devos posedi. La du povoj devas do esti kunordigitaj. Pro tio, unu el la ĉefaj problemoj kiuj prezentiĝas sekve de la projekto pri Eŭropa Unuiĝo estas la antaŭforigo de iaj rivalecoj inter la du organizoj,

[1] Vidu la *Bultenon* nº 41, Febr. 1931.

rivalecoj kiuj estas danĝeraj same por la internacia kiel por la socia paco, kaj la stabiligo de intima kunordigo inter la laboro de la Internacia Labororganizo kaj tiu de la Eŭropa Unuiĝo en la kampo de la laborprotektado.

La Internacia Laboroficejo estas ĉiam preta oferi por tiuĉi realigo, kiun ĝi konsideras nepre necesa, ĝian tutkoran kunlaboradon.

---

### La Progresoj de la Senlaboreco-Asekuro.

En sia unua kunsido, okazinta en Washington en la jaro 1919, la Internacia Labora Konferenco adoptis rezolucion pri la senlaboreco-asekuro. Estas interese konstati la progresojn faritajn en tiu kampo dum la ĵus pasintajdek jaroj.

Ĉe la komenco de 1919, la nombro de la laboristoj asekurataj kontraŭ la senlaboreco estis taksita inter 4.500.000 kaj 5.000.000. La plej granda nombro troviĝis en Granda Britujo, la sola lando kiu havis devigan asekuron kontraŭ senlaboreco, kaj tiam eĉ nur en kelkaj industrioj. Hodiaŭ, deviga senlaboreco-asekuro ekzistas en dek landoj. Ĝi kovras, se oni aldonas la landojn kun nedeviga asekuro, ĉirkaŭ 47.500.000 laboristojn entute.

Jen la nombroj por la diversaj landoj :

1. *Landoj kun deviga asekuro* :

| | |
|---|---|
| Australio : Queensland | 137.000 [1] |
| Aŭstrujo | 1.300.000 [1] |
| Bulgarujo | 287.000 |
| Germanujo | 16.738.000 |
| Granda Britujo kaj Norda Irlando | 12.100.000 |
| Irlanda Libera Ŝtato | 284.000 |
| Italujo | 2.600.000 [1] |
| Polujo | 1.033.000 |
| Svisujo (9 kantonoj) | 150.000 [1] |
| U.S.S.R. | 10.000.000 [2] |
| Kune | 44.629.000 |

2. *Landoj kun nedeviga asekuro :*

| | |
|---|---|
| Belgujo | 628.000 |
| Ĉeĥoslovakujo | 1.129.000 |
| Finlando | — [3] |
| Francujo | 200.000 |
| Nederlando | 43.000 |
| Svisujo (14 kantonoj) | 165.000 |
| Kune | 2.841.000 |

Oni konstatas do ke la nombro de la laboristoj asekurataj kontraŭ la senlaboreco pasis de proksimume 4.500.000 en 1919 al almenaŭ 47.500.000 en 1929, tio estas dekobliĝis dum la lastaj dek jaroj.

### Japanujo ratifas ĉialian Laborkonvencion

La Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj enskribis la 4an de decembro 1930 la ratifon, per la Japana registaro, de la Konvencio fiksanta la minimuman aĝon por la akcepto de junuloj al la laboro kiel karbordigistoj kaj hejtistoj surŝipe. La Internacia Laboro-Konferenco adoptis tiun konvencion en ĝia tria kunsido (Genève, 1921). Ĝis nun, Japanujo ratifis senkondiĉe la sekvantajn dek konvenciojn de la Internacia Laboroficejo :

1) Senlaboreca kompenso ĉe perdo pro ŝippereo ;
2) Minimuma aĝo (industrio) ;
3) Minimuma aĝo (surŝipe) ;
4) Dungigo de maristoj ;
5) Minimuma aĝo (agrikulturo) ;
6) Minimuma aĝo (hejtistoj kaj karbordigistoj) ;
7) Kuracista ekzameno de junuloj laborantaj surŝipe ;
8) Kompenso pro profesiaj malsanoj ;
9) Egaleco de traktado (laborakcidentoj)
10) Inspekto de elmigrantoj surŝipe.

Ĝi plie adoptis aliajn aranĝojn aplikantajn konvenciojn aŭ kun tendenco al apliko de ili en la kvin subaj problemoj ankaŭ pritraktataj per konvencioj de la Internacia Laboroficejo :

1) Akuŝo ;
2) Nokta laboro de la virinoj ;
3) Nokta laboro de la infanoj ;
4) Blanka fosforo ;
5) Pezo de pakaĵoj transportataj surŝipe.

### Granda Britujo kaj la Konvencio pri Perforta Laboro

Kiel oni scias, la dekkvara Internacia Laborkonferenco, kunveninta en Genève en 1930, adoptis Projekton de Konvencio pri la perforta aŭ deviga laboro, kiu celas precipe reguligi la laboron de la indiĝenoj en la kolonioj.

Unu el la landoj kies ratifo de tiu konvencio havas plej grandan valoron por la progreso de la indiĝena laboristaro estas Granda Britujo. Je tiu vidpunkto, estas interese noti deklaron faritan de la Brita Laborministro, Miss Bondfield, ĉe la Deputitara Ĉambro la 18an de decembro 1930.

Respondante al deputito Hudson, ŝi diris : « La registaro nepre intencas ratifi la Konvencion, sed ĝia artikolo 16 postulas ke la ratifo komprenu deklaron pri la aplikokampo de la konvenciaj reguloj en la kolonioj. Estis necese, sekve konsulti ĉiujn interesatajn aŭtoritatojn pri la ebleco apliki la konvencion, antaŭ ĝin ratifi. Juĝante el la respondoj ĝis nun ricevitaj, oni povas forte esperi ke la ĝenerala apliko de ĝiaj reguloj estos ebla. [1] »

---

## PAĜO PRI KOOPERADO (Fino)

**(vidu la pritesiman paĝon)**

La internacia Komitato por interkooperativaj rilatoj ankaŭ ricevis dum tiu unua kunsido aliajn raportojn pri kiuj ni ne povas detale paroli, kiel tiu de S-ro Ferd. Klindera, prezidanto de la Ĉeĥoslovaka « Centrokooperativa », pri la diversaj eksperimentoj faritaj en sia lando, kaj tiu de S-ro E. Lustig, direktoro de la Ĉeĥoslovaka kooperativa pogranda societo, pri enketo pri la pograndaj magazenoj de la konsumaj kooperativoj.

La komitato decidis eklabori por kelkaj landoj enketon pri la ova komerco, kaj rekomendis fine la starigon, en ĉiuj landoj kie ili ne ankoraŭ ekzistas, de kunaj komitatoj inter agrikulturaj kooperativoj kaj konsumaj kooperativoj, kiuj laborus akorde kun la internacia komitato.

* *

La internacia komitato por interkooperativaj rilatoj havos sian proksiman kunsidon la 23-an kaj 24-an de junio 1931.

[1] Proksimuma nombro.
[2] Proksimuma nombro. Depost la 9-a de oktobro 1930, la registaro ĉesigis ĉiujn asekuropagojn ĝis nova decido, pro la kondiĉoj de la laboro-merkato.
[3] Nenia nombro ricevebla.

[1] Citita el «Parliamentary Debates, House of Commons», 18-an decembro 1930.

## La Internacia Komitato por Interkooperativaj Rilatoj

La Internacia Ekonomia Konferenco de la jaro 1927 en Genève esprimis la deziron ke la klopodoj de la agrikulturaj kooperativaj organizoj kaj de la konsumaj kooperativaj organizoj por kunlaboro estu « sekvitaj, kuraĝigitaj kaj antaŭenpuŝitaj dank'al la starigo de komuna komitato de la agrikulturaj kaj konsumaj kooperativaj organizoj, naciaj kiel internaciaj. »

La « Internacia Komitato por Interkooperativaj Rilatoj », kiu antaŭ nelonge estis starigita post diversaj preparaj kunsidoj okazintaj dum la jaroj 1929 kaj 1930, povas esti konsiderata kiel la efektiviĝo de tiu deziro. Ĝia kunmeto kaj ĝia celo plene respondas al la ideo defendita de la Ekonomia Konferenco.

Tiu Komitato komencis sian laboron dum malferma kunveno okazinta en salono de la Internacia Laboroficejo la 9an kaj 10an de februaro 1931an.

Ĝi entenas en sama nombro reprezentantojn de la Internacia Kooperativa Alianco (London) kaj de la Internacia Agrikultura Komisiono (Paris). Inter tiuj reprezentantoj ni povas nomi por la I.K.A. ĝiaj du vic-prezidantoj, Sir Thomas Allen kaj S-ro E. Poisson, kaj ĝia ĝenerala sekretario, S-ro H. J. May ; por la I.A.K., la markizo de Voguë, prezidanto, kaj S-ro Jules Gautier, Vic-prezidanto de la I.A.K.

La nova interkooperativa organo celas « helpi la kreskigon de la moralaj kaj ekonomiaj rilatoj inter la agrikulturaj kooperativoj kaj la konsumaj kooperativoj, » kaj plie « efektivigi la kunigon de la kooperativa movado kun la internaciaj institucioj, precipe kun la ekonomia organizo de la Ligo de Nacioj, la Internacia Laboroficejo kaj la Internacia Agrikultura Instituto. »

La Komitato unuvoĉe elektis S-ron Albert Thomas, Direktoro de la Internacia Laboroficejo, kiel sia sendependa prezidanto. Ĝi decidis tuj post sia starigo regule inviti al siaj kunsidoj la reprezentantojn de la institucioj al kiuj ĝi deziras proksimigi la kooperativan movadon (Ligo de Nacioj, Internacia Laboroficejo, Internacia Agrikultura Instituto) kaj plie reprezentanton de la internacia kooperativa pogranda societo. Kiam ekzistos samspeca internacia agrikultura organizo, ĝia reprezentanto ankaŭ estos invitata ĉeesti la kunsidojn.

La unuaj diskutoj montrigis grandan deziron por daŭra kunlaborado. Ili substrekis la kontribuon kiun la agrikulturaj kooperativaj kaj konsumaj kooperativoj povas doni al la ekonomia reorganizo. Dank'al la kreskado de la interkooperativaj rilatoj kaj interŝanĝoj, ili povas ebligi pli bonan alkonformigon de la proponado al la postulado de komercaĵoj, pli efikan organizon de pli regula merkato, kaj pli grandan forigon, por la bono de ĉiuj, de iomaj malŝparegoj en la distribuado de la agrikulturaj produktoj.

Inter la pluraj raportoj prezentitaj al la Komitato dum ĝia unua kunsido (februaro 1931) ni citos nur la plej gravajn.

*
* *

S-ro H. J. May, ĝenerala sekretario de la Internacia Kooperativa Alianco, prezentis raporton pri la rektaj rilatoj inter la angla pogranda kooperativa societo kaj la « New Zealand Producers' Cooperative Marketing Association » (t.e. la Nov-Zelanda Asocio de produktistoj por kooperativa vendo).

La du supraj organizoj starigis komunan akcian societon nomitan « New Zealand Produce Association » kies solaj akciuloj estas la du organizoj, en sama kvanta de kapitalo. La aferoj estas faritaj laŭ la ordinaraj komercaj kondiĉoj. La profitoj, kiujn antaŭe konservis la komercistoj, nun estas ĉiu-jare dividitaj inter la produktistoj kaj la konsumantoj.

La Nov-Zelanda vendo-organizo okupiĝas pri la ekspedo, la asekuro kaj la financaj aranĝoj en la lando de produktado, kaj informas la Londonan komunan societon pri la sendoj. Ĝi ankaŭ sciigas al siaj membroj la prezojn atingitajn kaj transdonas al ili ĉiujn sciigojn ricevitajn de Anglujo. La Londona societo ricevas la komercaĵojn, okupiĝas pri la enmagazinigo se tio estas necesa, agas kiel vendo-agento kaj fiksas la prezojn je kiuj la komercaĵoj devas esti vendataj en la angla merkato.

La angla pogranda societo ne estas devigata aĉeti nur la produktojn de la Nov-Zelanda asocio, kaj tiu lasta povas siaflanke vendi ilin ankaŭ alie.

Tia aranĝo donis tre bonajn rezultatojn.

La komuna societo vendas en Granda Britujo buteron, fromaĝon kaj aliajn produktojn de la Nov-Zelandaj agrikulturaj kooperativoj kunigitaj en la Nov-Zelanda organizo. Dum la jaro 1928, la vendoj atingis 1.669.543 anglaj fundoj, el kiuj 781.422 fundoj al la angla pogranda societo.

*
* *

Alian interesan raporton prezentis S-ro Poisson, vic-prezidanto de I.K.A. Tiu raporto temas pri kunagado inter la konsumaj kooperativoj kaj la agrikulturaj kooperativaj asocioj por la vendo de tritiko, faruno kaj pano.

S-ro Poisson unue rememoris la eksperimentojn jam faritajn, la diversajn komercajn interŝanĝojn kiuj efektiviĝis inter kooperativaj panvendejoj kaj muelejoj apartenantaj al agrikulturaj kooperativoj, k.t.pl.

Li montris poste ke se tiuj traktadoj estas jam treege interesaj laŭ la kooperativa vidpunkto, ili tamen ne sufiĉas, ĉar la du kooperativaj organizoj restas en ili du kontraŭbatalantoj ; la unu estas vendisto, la alia aĉetisto ; kaj iliaj interesoj estas malsamaj.

Pro tio, S-ro Poisson proponas ke la Komitato studu la eblecon starigi, dank'al kuna kaj paralela agado, kooperativajn organizojn kiuj estus *organike* ligitaj una al la alia kaj eĉ havus komunajn instituciojn.

Li daŭrigas sian raporton per detala prezentado de du projektojn kiujn komuna franca komitato starigita en 1930 de la « Nacia Ligo de la Konsumaj Kooperativoj » kaj de la « Nacia Ligo de Tritikoproduktistoj » preparis tiacele. La unua projekto temas pri starigo de kooperativa muelejo, kiu apartenus al la konsumaj kooperativoj kaj al la agrikulturaj kooperativoj por la vendado de tritiko.

La dua projekto celas starigon de granda panfabriko, komuna posedaĵo de konsuma kooperativo kaj de agrikultura kooperativa muelejo.

*
* *

*(Fino de tiu-ĉi artikolo je la antaŭa paĝo).*

L'IMPRIMEUR-GÉRANT : A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE